halle-saale
@esperanto.de

Panoramo-Info

Sciiga letero por la Esperantistaro en Saksio-Anhalto

15-a jarkolekto 2006-2

ANABEL

Aŭtuna Najbara Aranĝo kun Borso de E-Literaturo
la 21-an de oktobro 2006 en la fondaĵoj de Francke

Jugendwerkstatt Bauhof gGmbh
in den Franckeschen Stiftungen
Haus 33, Franckeplatz 1
06114 Halle

ekde Franckeplatz estos vojindikiloj (verda stelo)

09:00 alveno, eta matenmanĝo, kafo
10:00 promenado al la muzeo pri Händel
(novinstalita E-lingva sonbendo gvidos nin tra la ekspozicio)
12:00 tagmanĝo
14:00 prelegetoj, kultura programeto
kafotablo kaj babilado ĝis la fino.

Dum la tuta aranĝo estos la libroservo de Rolf Beau.
ni havos eksterlandajn gastojn.

jogo

G. F. Händel,
pentraĵo de Carl Jäger

la naskiĝdomo de G. F. Händel, hodiaŭ muzeo

Händelfest

La 11-an de junio 2006 la E-grupo invitis al Halle por spekti la urbon dum Händel-festivalo. Joachim Gunkel profesie gvidis nin tra la urbo kaj montris al ni la vidindaĵojn de Halle de sur Hausmannstürme *(la turoj de Hausmann)*.
La turo troviĝas ĉe preĝejo sur la foirplaco de Halle, sed posedas ilin la urbo.
Dum tiu varmega tago ni ofte ripozis.
Vespere ni piknikis ĉe la benko de Eichendorff kaj kantis tie la kanton “Staras burgo super valo”.
Finiĝis la tago per spektado de korusa koncerto en la parko Amtsgarten je la piedo de la burgo Giebichenstein.

jogo

Bad Lausick

La 2-an de julio 2006 okazis kradrostado kaj kafumado en Bad Lausick. Gastigantoj estis Wolfram Rohloff. Ankaŭ Alida Kaplick helpis en la prepara organizado. Ŝi kunportis siajn lernantojn el la kurso, kiun ŝi okazigas en la popolaltlernejo de Leipzig. Entute ĉeestis preskaŭ 20 personoj, plejmultaj el Saksio kaj 4 el Saksio-Anhalto.
Inter kafumado kaj kradrostado Wolfram gvidis nin tra la urbo, kiu havas belegan parkon.
Bedaŭrinde simila aranĝo ne povos okazi venontjare en la sama loko, ĉar Wolfram Rohloff traloĝiĝis al alia urbo.

jogo

Spielehaus

La 13-an de julio 2006 estis malgranda renkontiĝo Spielehaus. La plano estas okazigi tiun babiladan rondon unufoje en la monato. La loko alternas: Lepsiko (Leipzig) kaj Halle. La sekvaj fojoj estos: la 20-an de oktobro en Lepsiko kaj 15-an de novembro denove en Halle.

jogo

Lyonel Feininger (1871-1956)

En la pasinta eldono de Panoramo Info ni atentigi pri pentristo, kiu estas konata preskaŭ nur al la loĝantoj de Halle. Hodiaŭ ni presentas mondvaste konatan pentriston, kiu verkis famajn bildojn pri Halle.
Lyonel Charles Adrian Feininger estis naskita la 17an de julio 1871 en Novjorko. Kiam li estis 16-jara, li venis la unuan fojon al Germanio por viziti siajn gepatrojn en Berlino. La gepatroj estis muzikistoj kaj havis koncerton tie. En oktobro 1888 li sukcesis la komencan ekzamenon de la Reĝa Akademio en Berlino. En 1892 li studis dum sep monatoj skulptadon en Pariso ĉe Filippo Colarossi. Reveninte al Berlino li komencis labori kiel desegnisto de karikaturoj por diversaj germanj, francaj kaj usonaj gazetoj kaj ĵurnaloj.
1901 li edziĝis al Clara Fürst. 1905 li konatiĝis kun Julia Berg kaj foriris de sia edzino kaj siaj du filinoj. Dum februaro 1906 li vizitis la urbon Weimar, kie studis Julia ĉe la Grandduka Artlernejo.
Same kiel Albert Ebert (*vd. PI 2006-1*) li malfrue komencis pentri. Li havis jam 36 jarojn, kiam li ekis pentri. Ĉiam li tre rigore pritaksis siajn verkojn. Baze de siaj desegnaĵoj li rapide evoluis tre karakteran propran stilon. En liaj bildoj li abstraktis de la objektoj kaj arte prilaboras ilin por levi ilin super la realan/naturan aspekton. En 1911 ses de liaj petraĵoj estis ekspozitaj en galerio en Parizo. Laŭ invito de Franz Marc li ekspoziciis kun kun la Blua Rajdanto (“Blauer Reiter”, asocio de avanaj artistoj).

La forta impreso de liaj bildoj influis multajn aliajn artistojn de lia tempo. Tui impresigo de liaj bildoj fondis lian sukceson kaj famon. Ofte li verkis pri la sama objekto kelkfoje de diversaj malgrandaj skizoj ĝis granda pentraĵo. Tre famaj estas liaj bildoj pri la centroj de vilaĝoj ĉirkaŭ la urbo Weimar (en Turingio). Al tiu regiono li ofte vojaĝis inter 1906 kaj 1937 por studi kaj labori. Liaj bildoj ofte havas titolon laŭ la nomo de la vilaĝo (Gelmeroda, Possendorf, Mellingen ktp) kun aldonita numero.



la preĝejo sur la foira placo en Halle

Antaŭ nelonge la Germana Poŝto eldonis poŝtmarkon kun lia bildo *“la preĝejo sur la foira placo en Halle”*. Li pentris la preĝejon dum diversaj tagoj kaj dum diversaj tempoj de la tago kaj kombinis ĉion en unu bildo. La bildojn pri Halle li verkis en 1930/31, kiam li restis en nia urbo laŭ invito de la magistrato.
Grava parto de lia vivo estas ligita al la ŝtata arta fondaĵo Bauhaus. Walter Gropius vokis lin 1919 al Weimar por estri la atelierojn pri presdo. En la jaro 1925 Bauhaus estis fermita en Turingio pro politikaj kaŭzoj kaj oni translokigis ĝin al Dessau. La 30-an de julio 1926 la familio Feininger prenis novan loĝejon en unu el la novkonstruitaj “Domoj de la Majstroj”. Feininger petis pri nuligo de siaj devoj de instruado por libere verki. Ĝis 1932 li restis en Germanio. Verŝajne pro la deziro de Gropius li ne foriris pli frue. La verkoj de Feininger estis deklaritaj de la nazioj kiel “degenerita arto”.
Lyonel Feininger mortis la 13-an de januaro 1956 (antaŭ 50 jaroj) en sia naskiĝurbo Novjorko.

jogo

Nova regulo ĉe Radio Corax

Kiel nia Esperanto-elsendo “Iomete Esperanto”, tiel ankaŭ multaj aliaj elsendoj postulas firman elsendo-tagon. Sed la monato ne ĉiam havas 4 dimanĉojn, lundojn, ktp.. Ekzemple la monato havas 5 dimanĉoj, tiam estus la kvina eble tute sen elsendo, ĉar “Iomete Esperanto” estas elsendata nur ĉiun duan dimanĉon, alia elsendo ĉiun trian, ktp.. La kvina dimanĉo estas ne planita.
Por solvi tiun problemon kaj tamen doni kalkuleblajn elsendo-tagojn al la programeroj, ĉiuj Radio-aranĝantoj povas sendi en ritmo de kvar semajnoj. Je la 10a de septembro (je la 11a horo) ”Iomete Esperanto” estis elsendita kiel kutime. Ekde tiu tago oni povas aŭskulti nin ĉiam post kvar semajnoj. La elsendotagoj de la sekvaj monatoj: 4a de novembro, 3a de decembro ... .
Radio Corax estas aŭdebla ne nur per kutima radioaparato sed ankaŭ per la reto. La hejma paĝo de la projekto estas **http://www.radiocorax.de** Tie vi trovas ligon al la programo kaj al la reta elsendado (livestream). Per la reto vi havas pli bonan kvaliton. La reta elsendo estas havebla per la adreso *http://212.122.41.133:8000/corax.ogg*
Por ĉiu komputilo ekzistas senkosta programo por aŭskulti retan radion.

ugg

REVO

La 22-an fojon okazis nia ***Renkontiĝo Esperantista en VorlicO*** la 26-an de aŭgusto 2006. Kiel kutime ni komencis la promenadon ĉe la urbodomo de Vorlico (Wörlitz). Venis Esperantistoj el Malsupra Saksio kaj Saksio-Anhalto. Tra la gastdomo Eichenkranz, kiu finfine estas renovigata ni iris al la parko. Flanke de nia vojo estis Eisenhart, Rousseau-insulo kaj la ponto de Wolf. Tiel ni venis al la Gotika Domo. Afabla virino gvidis nin tra la domo kaj montris al ni ĝiajn trezorojn.

Ege famaj estas la fenestroj de pentrita vitro. Mirinde la koloroj brilas pro la trafluanta lumo. Tiuj fenestroj venis el Svisio fine de la 18a jarcento. La svisa teologo, filozofo kaj verkisto Johann Kaspar Lavater helpis al la princo Franz aĉeti ilin. La plej fama inter la vitraj bildoj estas la bildigo de la rakonto pri la perdita filo (vd. la suban bildon).
Post kiam ni tiel nutris niajn okulojn kajn mensojn ankaŭ la stomakoj fariĝis postulemaj. Bonŝance ne tro for de la Gotika Domo estas la templo de Flora, kie apudas por preni tagmanĝon. La vetero dum la tago ne favoris nin dum tiu tago. Pli kaj pli densa fariĝis la pluvo. Tiuj, kiuj adiaŭis jam post la tagmanĝo, restis pli sekaj. Sed tiuj ankaŭ ne vidis la kolonon sur la monumento, kiu ekde nur tri tagoj denove estas en sia loko. La kolono estas originalo el la pereinta urbo Herculeanum.
Venu venontjare al REVO por malkovri alian parton de la parko, kiu estas monda heredaĵo laŭ la listo de UNESCO.

jogo

regulaj renkontiĝoj

Eo-grupo PANORAMO - Halle:
1-a mardo, 18.ooh: E.-Abderhalden-Str. 20
3-a mardo, 18.ooh: Bölbergasse
(restoracio "Zum Schwarzbrenner")

Eo-Gruppe Magdeburg:
ĉiu 2a mardo (ne en julio, aŭgusto),
Steubenallee 2

Eo-Klubo "Karapaco"
Zeitz: Dirk Bindmann, ✆+🖷 03441-273251
walden@t-online.de
Altenburg: kaiser-altenburg@t-online.de
✆ 03447-4012

eventoj

pliaj:
http://aliaflanko.de/kalendaro/
http://www.eventoj.hu

01.-03.12.2006 **Herzberg**
Intensa trejnado en ĉiuj niveloj, **ICH**

08.-10.12.2006 **Herzberg**
31a studadsesio, **ICH**

08.-10.12.2006 **Usti nad Labem**
18a Kultura Festivalo
www.esperanto.cz m.smycka@seznam.cz

09.-12.12.2006 **Ĉeĥa-Saksa Tago**
kiz@kr-ustecky.cz

28.04.2007 **Bernburg**
jarĉefkunveno de **ELSA**

19.05.2007 **Schkeuditz**
promenado al Domholzschänke
E-grupo Halle

25.08.2007 **Wörlitz**
REVO Renkontiĝo en la parko de Vorlico
E-grupo Halle

27.10.2007 **Halle**
ANABEL Aŭtuna renkontiĝo
en la Fondaĵoj de Francke
E-grupo Halle

adresoj

DEB - Deutscher Esperanto Bund
Immentalstraße 3, 79104 Freiburg,
✆ 0761-289299, Info 0180-esperanto
(-3773726)
gea@esperanto.de http://www.esperanto.de

UEA - Universala Esperanto Asocio
Ĉefdelegito por Germanio:
d-ro Wolfgang Schwanzer,
Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz
✆ 06136-46232, http://www.uea.org

SAT - Sennacieca Asocio Tutmonda
Peranto por Germanio: Jiri Proskovec,
Heimbaustraße 10, 44143 Dortmund
proskovec@aol.com

ELSA - E-Ligo Saksio-Anhaltio
Jörg Gersonde, H.-Wäschke-Str. 31,
06366 Köthen, ✆ 03496-558517
joerg.gersonde@esperanto.de

E-Grupo "PANORAMO" Halle
Siegfried Linke, Fischerstecherstr. 23,
06120 Halle, ✆+🖷 0345-5500348,
halle-saale@esperanto.de
http://www.esperanto-halle.de

E-Grupo Magdeburg
Edith Plümecke, Simonstraße 15,
39114 Magdeburg, ✆ 0391-8117421
DDungert@t-online.de
http://www.beepworld.de/
members75/esperanto-dungert

E-Grupo Leipzig
Werner Geidel, Karlsruher Str. 5 d
04209 Leipzig, ✆ 0341-4118577

ICH Internacia Centro Herzberg
Peter Zilvar, Grubenhagenstr. 6,
37412 Herzberg, ✆+🖷 05521-5983
esperanto-zentrum@web.de
http://www.ic-herberg.de

Literaturdienst "ESPERO"
Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18
27333 Schweringen, ✆+🖷 04257-983223
RoBo.ESPERO@t-online.de

Bücherdienst/Libroservo
wolfgang.schwanzer@esperanto.de
http://www.esperanto-buchversand.de
✆ 06136-46232

PANORAMO-Info

Herausgegeben von der Esperanto-Gruppe „PANORAMO" Halle,
fina redaktoro: Jörg Gersonde, H.-Wäschke-Str. 31,
06366 Köthen, 03496-558517, joerg.gersonde@esperanto.de
Bankverbindung: August Grosch, Kto.: 480 144 352,
BLZ 800 537 62, Stadt- und Saalkreissparkasse Halle